

Annette von Droste-Hülshoff,  
 Lastaj vortoj  
*tradukita de Joseph Ferdinand Berger*

Amatoj, kiam min forlasis  
 spirit', ne ploru do pro mi!  
 Por paca ekzistad' min kaŝis  
 en brila tag' la bona Di'.

Ne estas plu ĉagreno tera.  
 Eternas via bild' ĉe mi.  
 Mi petos pri balzamo vera  
 por vundoj kaj dolor' de vi.

Se svingas Pac' en nokta ombro  
 Seraffugilojn super Ter',  
 ne pensu plu pri mia tombo!  
 Salutas mi el stela sfer'.

...

Annette von Droste-Hülshoff,  
 Lastaj vortoj (1)  
*tradukita de Manfredo Ratislavo*

*1a traduk-versio*

Karuloj, kiam pasis mia  
 Spirit', pri mi ne ploru vi;  
 Ĉar lumas jen en paco Dia  
 Eterna tago ja al mi.

En tiu senaflikta foro  
 Memoru daŭre mi pri vi,  
 Por viaj vundoj kaj doloro  
 Mildigon volas peti mi.

Se nokte per flugilo sia  
 Pac' tuŝas tiun mondon ĉi,  
 Ne pensu plu pri tombo mia,  
 Vin de l' stelar' salutas mi.<sup>2</sup>

...

Annette von Droste-Hülshoff,  
 Lastaj vortoj (2)  
*tradukita de Manfred Retzlaff*

*2a versio*

Karuloj, kiam pasis mia  
 Spirit', pri mi ne ploru vi;  
 Ĉar lumas jen en paco Dia  
 Eterna tago ja al mi.

En tiu senaflikta foro  
 Memoru daŭre mi pri vi,  
 Por viaj vundoj kaj doloro  
 Mildigon volas peti mi.

Se venas kun flugilo sia  
 La nokta paco al la Ter',  
 Ne pensu plu pri tombo mia,  
 Salutas mi el stela sfer'.

...

---

<sup>2</sup>aŭ: Ĉar de l' stelar' salutas mi.

*Traduko de la Germana poemo "Letzte Worte" de ANNETTE VON DROSTE-HÜLSHOFF (\*1797-01-10 – †1848-05-24) en Esperanton de JOSEPH FERDINAND BERGER (\*1894-10-07 – †1976-03-28) en 1958.*

*Arg-160-467 (2009-11-22 09:37:58)*

*Tiu ĉi traduko de la poemo estas unue publikigita en 1958, ĝi aperis en la Esperanto-revuo "Norda Prismo", n-ro 58/2, sur paĝo 74. Vidu ankaŭ la ttt-ejon "http://donh.best.vwh.net/Esperanto/Literaturo/Revuoj/np/np5802/lastaj.html" de s-ro Donald Harlow el Pinole CA-94564, Kalifornio. Malgraŭ la supra indiko la poemo ne estas verkita de la poetino mem, sed - laŭ pli nova scienca ekkono - de ŝia nevino Elisabeth, post la morto de Annette von Droste-Hülshoff. Oni ĝis nun nur atribuis la poemon al Annette von Droste-Hülshoff.*

*Pri Joseph Ferdinand Berger rigardu ankaŭ la retejon [http://wapedia.mobi/eo/Joseph\\_Ferdinand\\_Berger#2](http://wapedia.mobi/eo/Joseph_Ferdinand_Berger#2).*

*Traduko de la Germana poemo "Letzte Worte" de ANNETTE VON DROSTE-HÜLSHOFF (\*1797-01-10 – †1848-05-24) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 2004-05.15.*

*Arg-160-316 (2004-05-16 13:55:41)*

*La origina versio de tiu ĉi poemo estas laŭ informo de l' 06.02.2003 fare de d-rino Edda Baußmann de la societo "Annette von Droste-Hülshoff" (Am Haus Rüschaus 81, D-48161 Münster/Westfalen, Germanio, [bausmann@droste-gesellschaft.de](mailto:bausmann@droste-gesellschaft.de), [www.droste-gesellschaft.de](http://www.droste-gesellschaft.de)) ne verkita de la poetino mem sed de ŝia nevino Elisabeth, post ŝia morto.*

*Traduko de la Germana poemo "Letzte Worte" de ANNETTE VON DROSTE-HÜLSHOFF (\*1797-01-10 – †1848-05-24) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 2004-05-16.*

*MR-311-5 / Arg-160-474 (2004-05-16 13:52:23)*

*La trian strofon mi, Manfred Retzlaff, ŝanĝis iom laŭ la modelo de la traduko de Josph Ferdinand Berger, uzante ankaŭ la rimvortparon "Ter' - sfer". En mia unua traduko-provo de l' 26.08.1997 resp. de l' 15.05.2004 mi iom tro ofte uzis la rimvortojn "mi, vi, ĉi". Tio certe ne estas tre bona solvo kaj efikas iom ĝena.*